

### **SOMERAJ RENKONTIĜOJ EN MADRIDO**

Dum la monatoj julio kaj aŭgusto pluraj esperantistaj amikoj vizitis Madridon, kaj havis la ŝancon renkontiĝi kun lokaj samideanoj.

Kiel ni jam anoncis, Taeko Osioka, ĵus pilgriminte la Jakoban Vojon, kunvenis dum pluraj tagoj fine de julio kun diversaj amikoj. Ŝi parolis pri sia urbo Hiroŝimo la 21-an, kaj ankaŭ rendevuis dum tiuj tagoj. La 23-an akompanis nin Ángel Arquillos kaj Mariló, el Malago, survoje al la Universala Kongreso en Bonaero.

Dum tiuj tagoj akompanis nin ankaŭ Olivjero, el Pizo, Italio, kiu laboris dum tiuj ĉi monatoj en Madrido. Ankaŭ vizitis nin fine de julio Dennis Keefe, usondevena aktivulo, kiu loĝis antaŭ pli ol dudek jaroj en Madrido, kaj ĝis antaŭnelonge en Ĉinio.

La 26-an de julio, interalie kun Dennis kaj Olivjero, ni kunmemoris la datrevenon de la apero de la Unua Libro per kultura kaj babila renkonto en la sidejo de Liceo kaj per komuna pikniko en la Parque del Oeste, ĉe la Monumento al Miguel Hernández.

Lunde la 11-an de aŭgusto pluraj madridanoj renkontiĝis kun Veronika Poór, el Hungario, aktiva interalie en la reta radio *Muzaiko*, kiu vizitis Madridon survoje el la UK en Bonaero.

Krome, la unuajn sabatojn de julio kaj aŭgusto okazis neformalaj renkontiĝoj en la Parko de Retiro, ĉe la statuo dediĉita al la pioniro Ricardo Codorniu.

### **VIZITOS NIN**

Dum la unua semajno de septembro vizitos Madridon Rosa López, el Tarrasa. Ŝi probable akompanos nin en la kutima unuasabata renkontiĝo, la 6-an, en la Parko Retiro, apud la statuo al Ricardo Codorniu, je la 17,30.

La 16-an kaj 17-an de septembro vizitos nian urbon So Gilsu, korea esperantisto, profesoro pri Ekonomiko ĉe Universitato Sokyong en Seulo. Li partoprenis en hispana kongreso, en Zaragozo, 1983, kaj estis estrarano de UEA de 1989 ĝis 1995. Oni anoncos rendevuon kun li per la kutimaj informaj kanaloj rete.

La juna poeto Nicola Ruggiero, el Italio kaj loĝanta en Rejkjaviko, alvenos al Madrido la 30an de septembro kaj foriros la 6an de oktobro frumatene. Ni provos organizi prelegon pri poezio en la unuaj tagoj de oktobro, kaj aranĝi aliajn pli neformalajn renkontiĝojn.

Ankaŭ brazila amiko Rafael Henrique Zerbetto anoncis ke li mallonge restos en Madrido survoje la 30an de septembro. Oni provos organizi renkonton kun li.

### **IBERIA RENKONTIĜO**

La ĉijara Iberia Renkontiĝo, ĉiujare organizata de la junularaj asocioj de la duoninsulo, okazos en L'Arboç (Katalunio), la 5an, 6an kaj 7an de septembro.

Aliĝiloj kaj informoj estas troveblaj en [www.esperanto.cat/ir2014](http://www.esperanto.cat/ir2014). Organizantoj jam anoncis la definitivan programon, elŝuteblan el tiu retejo, interalie kun:

- Interkonaj ludoj
- Intensiva kurso de Esperanto (3 sesioj po 2 horoj)
- Dubosolvanto: pedagogiaj rimedoj por regi la sufiksojn -ig- kaj -iĝ-
- Prezento de Wikimedia
- Lingvaj ludoj por progresantoj
- Prelegoj, interalie pri Lingva Justeco
- Koncerto de *Llunàrics* (rokmuziko) *No Em Toques* (akustika punkroko) kaj de *JoMo*

## **NOVAĴOJ DE MEL**

MEL produktis novan pinglon, el tiuj fikseblaj sur vestaĵo, mansako, ktp. Ĝi mezuras 15 mm x 24 mm. La bildo estas la fontano Cibeles apud verda stelo kun la vortoj ESPERANTO kaj MADRID. La vendoprezio estas: 2 €, sed ĉiu membro de MEL ricevos senpage du pinglojn okaze de vizito al la sidejo.

Antaŭ kelkaj tagoj alvenis la oficiala respondo de *Comunidad de Madrid – Registro de Asociaciones*, kun aprobo de la nova statuto de MEL, kies demarŝojn ni komencis antaŭ preskaŭ unu jaro. Memoru, ke temis esence pri ŝanĝo de la oficiala adreso.

## **KURSO EN KARABANĈELO**

Post la prelego organizita de "Liberecana Asembleo de Karabanĉelo" kun SAT-en-Hispanio, ĉe socia centro "EKO" en strato Ánade de Karabanĉelo, pri kiu ni informis pasintnumere, oni organizis kurson de Esperanto, kiu disvolviĝis enkonduke en julio kaj rekomenciĝos en septembro. Ĝin gvidas Alex Escobedo, dum la matenaj sabatoj. Pliaj detaloj en <http://asamlibertariacarabanchel.wordpress.com/>

## **DIVERSAJ**

Inter la 4a kaj 11a de oktobro disvolviĝos la 22-a Internacia Semajno de Kulturo kaj Turismo, ĉijare en la urbo Salou. Informojn ĉe Luis Serrano: [luis\\_serrano@mixmail.com](mailto:luis_serrano@mixmail.com).

Fundación Esperanto kunvokis stipendion por partopreno de studentoj de Hispanio ĉe la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato de Poznan. Kontakto: [fundacion@esperanto.es](mailto:fundacion@esperanto.es).

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) celebris sian konferencon en Montevideo (Urugvajo) en julio. Dum ĝi estis aprobita la starigo de hispana sekcio de ILEI. Instruistoj de Esperanto interesiĝantaj kunlabori kun ĝi, bv. skribi al [kurso@esperanto.es](mailto:kurso@esperanto.es).

Ampleksa grupo de madridanoj partoprenis la Kongreson de Sennaciieca Asocio Tutmonda en Dinano (Bretonio, Francio). Informoj kun fotoj kaj filmoj ĉe la retejo de SAT: <http://satesperanto.org/Fotoj-k-filmetoj-kongresaj.2618.html>

La televidserio "*El Secreto de Puente Viejo*", elsendita ĉiutage je la 17,15 en Antena3 enkondukis historion kun rolulo esperantista. Eblas spekti ĝin rete en la adreso: <http://www.antena3.com/series/el-secreto-de-puente-viejo/>

Forpasis pro trafikakcidento la aktoro Álex Angulo, konata al esperantistoj pro sia rolo de instruisto de Esperanto en la filmo "La pedalaŭto".

Niaj amikoj el Reĝurbo (Ciudad Real) Raúl kaj Julie geedziĝis meze de aŭgusto. Gratulon!

## **KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ**

La kutimaj kunvenoj de MEL, rekomenciĝos komence de septembro, ĉiulunde post la 18,30.

Same la unua el la babilrondoj de la unuaj sabatoj okazos la 6-an de septembro, je la 17,30, denove en la Parko de Retiro, apud la statuo omaĝe al Ricardo Codorniu.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL <http://www.esperanto.es/mel>, la liston [http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto\\_madrid/](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrid/), kaj la Fejsbukan forumon <https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/>.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

<http://www.esperanto.es/mel/>

[madrid@esperanto.es](mailto:madrid@esperanto.es)



Redaktas Toño del Barrio

Komentojn kaj informojn sendu al [niavocho@gmail.com](mailto:niavocho@gmail.com)